Universala Esperanto-Asocio | AKTIVULA MATURIGO | Estrara Subteamo: MOVADO

*EKO 2015-21*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.*

## AMO aldonas en 2015 plian okon – eble pli!



En EKO 18 ni prezentis la AMO-seminariojn 12 (Raleigh, Usono) kaj 13 (Kinŝaso, DR Kongo). Apude, vi vidas foton de ĵusa preparkunsido por tiu seminario.

Ĵus hodiaŭ ni sukcesis kompili la programon ĝis preskaŭ la jarfino; laŭ tio estos okazintaj en 2015 almenaŭ ok seminarioj (same kiel 2014) kun ebleco eĉ de naŭa. Jen la sekvaj:

**AMO 14** okazos kadre de la Internacia Junulara Kongreso (IJK) de TEJO en Wiesbaden, Germanio. Pri IJK vidu ĉe: http://ijk2015.tejo.org/ . Temoj verŝajne estos projektmastrumado kaj teamlaboro. Detaloj sekvos.

**AMO 15:** Jen la unua seminario en Francio, ĝi okazos en **Kulturcentro Greziljono** de la 25a ĝis la 31a de oktobro 2015, kune kun aŭtuna staĝo; ambaŭ aranĝoj eluzos la aŭtunajn lernejajn feriojn de Francio. La seminaria temo estos 'Grimpi la monton granitan' kaj kvar el la seminariaj tagoj nomiĝos laŭ alpista metaforo: etapoj. Ili prezentas la kvar rekonatajn stadiojn por la enpreno de novuloj en nian komunumon. *Etapo 1*: Kiel krei intereson. *Etapo 2*: Kiel anonci kurson. *Etapo 3*: Kiel instrui la lingvon. *Etapo 4*: Kiel gvidi al aktiva uzado. Tio signifas, ke la seminario kuntiros fadenojn de pluraj ĝisnunaj AMO-seminarioj; tio estas detalumita en la sube donita vikia AMO-paĝaro. La seminarion gvidos Stefan MacGill, kiu mem ĉeestis plurajn seminariojn kaj zorge protokolis ilin. Kvina tago dediĉiĝos al komuna plenumo de rol-ludo pri tiu amata kvinlanda kontinento Azanio, kiu nepre bezonas fondon de kontinenta komisiono. Pli detala programskizo disiros kun baldaŭa EKO-komuniko. Seminaria aliĝado estas farebla pere de la retejo de Greziljono, kadre de aliĝo al la aŭtuna staĝo, laŭ kondiĉoj kutimaj por tiu kulturcentro. Iru al http://gresillon.org/spip.php?rubrique36 por informoj kaj aliĝo.

**AMO 16:** Tiu seminiario okazos la 18an kaj 19an de novembro en Havano, tuj antaŭ **La 6a Kongreso de Esperanto en Kubo**, kiu okazos tie inter la 19a kaj la 22a de novembro 2015 kun temo 'Lingvoj kaj kulturoj: identeco en diverseco'. La ĉeftemo de AMO iom similos al tiu en Greziljono: 'Konsciigo, kapabligo, komunumo: paŝoj al plia profesiigo'. Gvidontoj estas Julián Hernández, Norberto Díaz, Vilhelmo Lutermano kaj Martiza Gutiérrez. La retpaĝo http://www.esperanto.cult.cu/ informas pri la kongreso kaj informos pri la seminario.

Nepalo petis prokraston de la akceptita seminario pro la tertremaj perturboj; ĝi estas nun antaŭvidita por februaro 2016. Lastajn novaĵojn kaj plion vi legos ĉe www.uea.org/vikio/Aktivula_Maturigo

## Ilustrita versio de la Estrara Raporto pri 2014

Tiu raporto aperas sur kvar paĝoj de la junia numero de revuo Esperanto, kune kun du paĝoj da financa raportado pri 2014. La tuto estas rete elŝutebla de la TEKO en la retejo de UEA. Nun la estraro pretigis ilustritan version en la formato PDF, kaj ni aldonas ĝin alkroĉe. La teksto en ĉi tiu versio restas identa kun tiu en la revuo, kiu cetere estas la oficiala raporto pri kiu la komitatanoj voĉdonos en Lillo. Ni enmanigas ĝin al landaj kaj fakaj asocioj, la gazetaro kaj membroj. Se iu el vi

trovas ion komentindan aŭ demandindan, komuniku tion al via komitatano (aŭ demandu rekte, pli frue!). Nun en finpreparo estas pli ampleksa sed maloficiala reta versio de la raporto. Komitatanoj kaj aliaj ricevos tion pere de baldaŭa EKO-komuniko.

## La Tago de Lernado de Lillo

Tio okazos sub la prizorgo de ILEI en la kongresa mardo. Ne okazos Seminario pri Kapabligo, do grandparte la programo de ILEI kovros ankaŭ tiun iom pli vastan terenon. Ja okazos tagfine (post la fermo de la Tago de Lernado) la kutima komitata forumo, kiu havos la taskon formuli rezolucion por prezenti al la Komitato en la vendredo. Tiu kunsido estas publika, do bonvenas instruistoj kaj ĉiuj kun edukaj interesiĝoj. Jen informo pri unu programero en la Tago de Lernado (pliaj informoj sekvos):

### *AMO tra 16 monatoj*

Ni priskribos la programon de UEA pri Aktivula Maturigo (AMO) kaj la ligitajn seminariojn kaj prezentos bilde resumon pri la 13 seminarioj okazintaj tra la pasintaj 16 monatoj; krome ni skizos planojn por pliaj seminarioj ĝis la jarfino kaj frue en 2016. Restos tempo por diskuto kaj demandoj.

## 116 pliaj kandidatoj por KER-ekzamenoj

En 2015 la Tutmonda Ekzamena Tago konsistis el du turnoj: aprile sesioj okazis en Greziljono (FR), La Chaux-de-Fonds (CH) kaj Managvo (NC). Tie ekzameniĝis entute 25 kandidatoj. En du lokoj el tri oni ekzameniĝis ankaŭ parole. La ĉefa ekzamentago estis la 30a de majo. Tiam estis ekzameno en 12 urboj de 7 landoj en tri kontinentoj, en kvar francaj urboj: Parizo, Tuluzo, Limoĝo kaj *Lannion*; en Brazilo du: Kuritibo kaj *Maceió*; en Japanio du: Tokio kaj Osako; krome la korea ĉefurbo Seulo, en Serbio *Subotica*; en Rusio Moskvo kaj en Nederlando Hago. En kvar urboj: Subotica, Tuluzo, Limoĝo kaj en Kuritibo estis ankaŭ parolaj sesioj, kiujn ni efektivigis tra la reto. En majo ekzameniĝis 91 personoj, tiel en la du ekzamentagoj ni havis entute 116 kandidatojn. El inter ili 37 petis ankaŭ la parolan parton.



Subotica elstaris pro modela organizado. Ĝi kunvenigis kandidatojn el tri landoj kaj havis grandan gazetaran reeĥon: du lokaj televidstacioj kaj unu radio-stacio dediĉis inter 10 kaj 30 minutojn al dissendo de raportoj pri la sesio kaj Esperanto. En la PDF, la foto prezentas intervjuon televidan faratan kun loka organizanto, s-ino Aranka Laslo. Pliaj informoj:

http://edukado.net/novajhoj?id=551

Foto: SMG

### *EKO venas al fino*

Restis pluraj temoj, sed alvenis la mal-eko; ili devos atendi la ekon de la sekva EKO.

Vortoj: 875

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.